# Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

| N-ro 4 1965 | ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH | 3-a periodo 31-a (37-a) jaro Monata |
|---|---|---|


# LA LANDA KUNVENO

## *Kunvoko*

Per ĉi tio ni kunvokas ordinaran landan kunvenon de Norvega Esperantista Ligo en la Universitato, Oslo, la 20an de Junio 1965 je la 9.00, en la kadro de la Nordlanda Esperanto-Kongreso.

Tagordo:

1. Malfermo per la prezidanto.
2. Elekto de kunvenaj funkciuloj (prokolantoj, kunvena prezidanto, elekta komisiono, komisiono pri plenrajtoj kaj voĉnombrado).
3. Jarraportoj 1963 kaj 1964.
4. Jarkalkuloj 1963 kaj 1964.
5. Alvenintaj proponoj (vidu sube).
6. Kiel denove kreskigi la membronombron?
7. Elekto de Konsilantaro, inkluzive de Estraro, anstataŭantoj kaj revizoroj.
8. Eventualaĵoj.

Jarraporto kaj jarkalkuloj por 1964 troviĝas aliloke en ĉi tiu numero.

*Pri punktoj 3 kaj 4.* Ĉar landa kunveno ne okazis en 1964, la jarraporto kaj jarkalkuloj pri 1963 ne estas traktitaj kaj aprobitaj de landa kunveno. La raportoj kaj kalkuloj pri 1963 kaj 1964 estas egale redaktitaj. La Estraro proponas legi nur tiujn pri 1964 en la ĉi-jara kunveno, sed petas la membrojn tralegi antaŭe tiujn pri 1963 en Norvega Esperantisto 4/1964, tiel ke oni povu ambaŭ jarojn kune pritrakti.

*Pri punkto 5.* a) Por iomete kompensi la ĝeneralan prezaltiĝon la Liga Estraro proponas malgrandan plialtigon (rondigon) de la kotizoj de ordinaraj membroj: por rektaj membroj de kr. 18,00 al kr. 20,00, por klubanoj de kr. 13,00 al kr. 15,00.

b) John Berggreen, prezidanto de Klubo Esperantista en Oslo, proponas jenan statutŝanĝon: § 10, 1a alineo, sonu (ŝanĝoj kursivitaj): «Forbundet ledes av et Forbundsråd *på 12 medlemmer* som velges av landsmøtet for tidsrommet inntil neste ordinære landsmøte, og skal bestå av formann, nestformann, generalsekretær, sekretær, kasserer, *informasjonsleder og undervisningsleder* og 5 rådsmedlem-

mer. De 7 førstnevnte danner Forbundsstyret. For Forbundsstyret velges 3 suppleanter.» — Motivigo: La proponanto substrekas la gravecon de la gvidantoj de la informado kaj de la studlaboro kaj opinias ke tiuj gvidantoj devas havi statute fiksitan lokon en la Liga Estraro. La Liga Estraro trovas preferinda, ĉar pli elasta, la ĝisnunan praktikon, nome ke la Estraro elektas la menciitajn komisiitojn. Ordinare oni tamen donas tiujn taskojn al personoj, kiuj jam estas estraranoj.

c) Kombine kun la supra propono John Berggreen prezentas ankaŭ jenan proponon: «N.E.L.s landsmøte 1965 henstiller til klubbstyrene at de fremsetter forslag på klubbens neste generalforsamling om at der såvidt mulig gjøres plass i klubbstyret til en informasjonsleder og en undervisningsleder med det mandat å aktivisere det utadvendte arbeide i klubben. I mindre klubber kan informasjonslederervervet eventuelt kombineres med nestformannstillingen». Motivigo kiel supre. — La propono signifas rekomendon ke la ĝisnunajn «studgvidanton» kaj «propagandestron» la kluboj prefere elektu inter la estraranoj anstataŭ kiel ordinarajn komisiitojn, kion jam multaj kluboj praktikas. Se la proponita rekomendo povos kontribui al pliaktivigo de la koncernaj laboroj, la Liga Estraro volonte subtenos la proponon.

*Pri punkto 6.* Jam dum multaj jaroj la membronombro de N.E.L. malkreskis de jaro al jaro. Tiu evoluo devas ne daŭri, ni devas iel haltigi ĝin kaj turni ĝin en kreskadon, alie ni devos grave redukti nian agadon. La Liga Estraro deziras serioze diskuti tiun situacion kun la membroj kaj la klubaj reprezentantoj.

La Liga Estraro admonas ĉiujn klubojn sendi reprezentantojn al la landa kunveno, kaj esperas ke ankaŭ multaj rektaj membroj ĉeestos la landan kunvenon kaj la Nordlandan Esepranto-Kongreson.

*La Liga Estraro.*

—

# AFRIKA REVUO

ALVOKO ! Ni organizos grandskalan ekspozicion de infandesegnaĵoj el la tuta mondo. Ĝi okazos en la kadro de la manifestacioj kiuj estos organizitaj en Léopoldville okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro. Por certigi la sukceson de tiu altnivela okazintaĵo, kiu certe helpos plialtigi la reputacion de nia asocio, ni do alvokas ĉiujn geinstruistojn, ĉiujn pedagogiajn institutojn kaj klubojn el la tuta mondo sendi al ni, *senprokraste,* infandesegnaĵojn.

*Temo:* okazintaĵoj pri la ĉiutaga kaj lerneja vivo, naciaj ludiloj, pupoj, maskoj, faŭno kaj flaŭro.

*Materialo:* desegna papero (proksim. 27 cm × 37 cm); akvarelo, paŝtelo, guaŝo, karbokrajono, tuĉo.

*Aĝo:* de 6 ĝis 15 jaraj infanoj. Dorsflanke menciu sur ĉiu desegnaĵo: nomo, adreso, aĝo de la infano, temo kaj eblaj klarigoj.

*Limdato:* ĉiuj desegnaĵoj devas esti en Léopoldville antaŭ la 1-an de septembro 65. La ekspozicio okazos fine de septembro. Sed ekagu tuj ! ĉar per boata vojo daŭras monatoj antaŭ ol ĉiu alvenos ĉe ni.

*Rekompenco:* ĉiu sendinto ricevos rekompence, ĉu poŝtmarkoj, ĉu la revuo dum unu jaro. — Ili mem precizu !

*Konga Esperanto-Instituto,*
*B. P. 7579,*
LÉOPOLDVILLE 1, KONGO





**Norvega Esperantisto**
ESPERANTOBLADET
*Redakcio:* Johan Hammond Rosbach, Hans Amund Rosbach
*Adreso de redakcio:* Boks 942, Oslo
*Abonprezo:* En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—.
*Anoncprezoj:* 1/1 paĝo kr. 150,— 1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,— 1/8 p. kr. 19,—.

# 1964 — kaj 1965 ?

La konkludo de la Jarraporto 1964, kiun vi povas legi en ĉi tiu numero de Norvega Esperantisto, ne estas ĝojiga: 1964 denove montras konsiderindan malkreskon de la membraro !

Kial malkreskas nia membraro? Ĉu ni ne sukcesas doni sufiĉe da utilo kaj amuzo? Aŭ ĉu la ideo de la esperantismo ne havas sufiĉe da realeco? Aŭ ĉu simple la televido, kombine kun la natura homa inerto, estas nia plej grava malhelpo?

Tio estu kiel ajn — membrojn ni bezonas. Multaj el ni ne estas tiel aktivaj kiel ni povus esti, sed ni pagas nian kotizon, kio jam estas avantaĝo. Ni bezonas monon, ni bezonas membrojn — grandaj nombroj estas imponaj! — kaj ni bezonas aktivulojn.

La konkludo de la Jarraporto aludas serĉadon de novaj vojoj. Certe ni bezonas ankaŭ novajn vojojn. Tial ni bezonas ankaŭ novajn ideojn.

Vi kaj ni devas zorgi, ke 1965 ne donos same malĝojigan rezulton. Ni fosu nian sulkon. Ĉiu el ni povas esti pli aktiva ol en 1964.

—

**Pluraj artikoletoj**

kaj alia materialo, i.a. ankaŭ raportoj al Norvega Kroniko devas atendi ĝis la venonta numero.

## *Sciigoj de N.E.L.*

*La kontorfondaĵo.* En 1964 ni denove ricevis pli multajn donacojn por la kontorfondaĵo, kiu ĉiam estis tre valora helpo por la Ligo. Ni permesas al ni denove atentigi la membrojn pri tiu grava konto por donacoj al nia laboro.

*La Propaganda Fondaĵo.* Samtempe ni memorigas ankaŭ pri la tre grava Propaganda Fondaĵo. Kvankam ĝi nun atingis la laŭstatute minimuman kapitalon, tiel ke ĝi povos ekesti utila, estas klare ke ju pli granda fariĝos la fondaĵo, des pli utila ĝi estos.

*Taskotabelo por la kluboj. — Majo:* Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La Estraro diskutas la aŭtunan laboron kaj planas kursojn.

*Raporto de la Liga Estraro pri la 1a jarkvarono.* Okazis 2 estrarkunvenoj. Oni elsendis 1 cirkuleron al la kluboj kaj rektaj membroj. Oni ellaboris kaj aprobis jarraporton 1964, kalkulojn 1964 kaj budĝeton 1965. Oni redaktis kunvokon de la landa kunveno kaj starigis ĝian tagordon. Oni decidis disponigi garanti-sumon de kr. 500,— por la Nordlanda Esperanto-Kongreso. Pro ekonomiaj kaŭzoj oni decidis ankaŭ en 1965 redukti n.ron 3 de Norvega Esperantisto al 8 paĝoj kaj kunigi n.rojn 5 kaj 6 en unu duoblan numeron 16-paĝan. Oni decidis pri klopodoj por aktivigi la membrojn en la kolektado de subskriboj al la peticio al U.N.O. Oni klopodas reaperigi la informgazeton «Esperanto-nytt».

*La Liga Estraro.*

# NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

## Jarraporto 1964

### ESTRADO

*La Liga Konsilantaro* dum la tuta jaro konsistis el:

Prezidanto: C. Støp-Bowitz
Vicprezidanto: Ludvig Anjer
Ĝenerala sekretario: Tom Arbo Høeg
Sekretario: Signe Haug
Kasisto: Karl Ekhaugen
Estraranoj: Olav Rygg, Jan Ekhaugen
Anstataŭantoj: Harda Danielsen,
Alfred Skyberg, Kjell Gustavsen
Ceteraj Konsilantaranoj:
Johannes Flodmo, Mo i Rana
Fin Hole, Mandal
Trygve Kvalvåg, Stavanger
Ragnv. Rian, Trondhejmo
Johan H. Rosbach, Sarpsborg.
Revizoroj:
John Selbekk, Karin Sandberg.

*Landa kunveno* ne okazis dum 1964.

### ADMINISTRADO

*Estrarkunvenoj.* Okazis 7 estrarkunvenoj (7 en 1963), kaj oni protokolis 89 punktojn (93 en 1963).

*Cirkuleroj.* La Estraro elsendis al la kluboj kaj distriktoj 6 ordinarajn cirkulerojn kun 2 enketoj (pri la klubkunvenoj kaj pri la Jaro de Internacia Kunlaborado), kun la turistbroŝuro pri Oslo, kun la subskribfolio por U.N.O. kaj kun invito al mendoj de donac- kaj propagand-abonoj al Norvega Esperantisto. Cetere oni publikigis informojn al la membraro en la rubriko «Sciigoj de N.E.L.» en Norvega Esperantisto. Tial nur 3 el la cirkuleroj estis sendataj ankaŭ al la rektaj membroj.

*La oficejon* estris la prezidanto kune kun la ĝenerala sekretario. Estis regula deĵoro tie dufoje semajne. La laboron dividis inter si la estraranoj; sed dum la Ligo kaj Eldonejo Esperanto A/S kune disponas ĉambreton de nur 6 m², la laboroj ne povas esti farataj tute kontentige. La Ligo kaj la Eldonejo havas komunan telefonon. Oni faris multajn, sed vanajn klopodojn por ekhavi pli grandan oficejon.

*La Oficeja Fondaĵo* dum la jaro donace ricevis kr. 267,05 (en 1963 kr. 147,40). La Estraro kore dankas al la kontribuintoj.

*La Financa Komisiono,* konsistanta el John Berggreen (prez.), Kirsten Ek, Johan Matland, Alfred Skyberg (membroj), pretigis belan «Alvokon pri Esperanto» kun petskribo pri kontribuaĵoj al la laboro por Esperanto, kun subskribo de 21 konataj esperantistoj kaj 16 konataj norvegoj. La petskribon kaj la Alvokon oni elsendis en nombro de 501, i. a. al ĉiuj komunumestraroj, kaj aldone la kluboj dissendis konsiderindan nombron. Rezultis per donacoj, kronrulado, lotumadoj k.t.p. kr. 2515,12; elspezoj (presaĵoj, afranko): kr. 1753,07; neta gajno kr. 762,05. Aldoniĝas la granda propaganda efiko. La laboroj estas daŭrigataj.

### DISTRIKTOJ, KLUBOJ KAJ MEMBROJ

*Distriktoj.* Neniu nova distrikta organizaĵo fondiĝis. Nordlanda Distrikto kaj Okcidenta Distrikto bone laboris, Meza Distrikto kaj Orienta Distrikto estis iom malpli aktivaj, 3 el la distriktoj okazigis jarkunvenojn. — Nord-Norvega Esperanto-Distrikto ne funkcias

*Kluboj kaj membroj.* Je la jarfino 1963 N.E.L. havis 22 aliĝintajn klubojn. Neniu nova klubo fondiĝis, kaj neniu klubo malfondiĝis. Je la jarfino 1964 N.E.L. sekve havis 22 klubojn.

Membrostatistiko:

| | |
|---|---|
| Bergen, La Esp.klubo de, Ok. D. | 29 |
| Bodø Esperantoklubb, N.D. | 11 |
| Gjøvik, Klubo Esp.-a de, Or. D. | 6 |
| Halden, Ascendo, Or. D. | 13 |
| Hamar, La Norda Stelo, Or. D. | 17 |
| Harstad, Noktomeza Suno, NNED | 7 |
| Haugesund, Mara Vento, Ok. D. | 45 |
| Horten, La Ponto, Or. D. | 12 |
| Jørpeland, Pacaj Batalantoj, Ok. | 6 |
| Kristiansands Esperantoklubb | 16 |
| Løten, La tri verdaj steloj de, Or. | 9 |
| Mandal, Esperantoklubo en | 8 |
| Mo, La Esperantoklubo en, N. D. | 7 |
| Odda, La Glaciaro, Ok. D. | 5 |
| Oslo, Klubo Esp.-a en, Or. D. | 150 |
| Sarpsborg, La Urso, Or. D. | 12 |
| Sauda Esperantoklubb, Ok. D. | 14 |
| Skorovatn, Skorovas Esp.kl., M.D. | 7 |
| Skudeneshavn La Granda Ideo, Ok. | 9 |
| Stavanger Esperantoklubb, Ok. D. | 10 |
| Tromsø, La Norda Lumo, NNED. | 6 |
| Trondhejmo, Grupo Esp.-a, M.D. | 42 |
| Sumo | 441 |
| Rekte aliĝintaj membroj | 130 |
| Subtenantaj membroj | 2 |
| Dumvivaj membroj | 10 |
| Honoraj membroj | 1 |
| Entute: | 584 |

Krome pagis 4 kontribuaj membroj.

La mallongigoj post la nomoj de la kluboj montras la distrikton, al kiu apartenas la klubo. 1 honora kaj 2 dumvivaj membroj estas samtempe klubanoj (po 1 en Oslo, Skudeneshavn kaj Trondhejmo). Specifo de la membraro laŭ kategorioj: klubanoj 352 ordinaraj, 18 junulaj, 55 familiaj, 11 junaj familiaj; rektaj membroj 111 ordinaraj, 2 familiaj, 17 junulaj. En la klubo en Oslo ekzistas junula grupo. Entute la membronombro montras perdon de 4,4 % kompare kun la antaŭa jaro.

### KLUBLABORO

*Superrigardo.* (Ĉar nur 20 el la 22 kluboj ensendis ĉiujn devigajn raportojn, la subaj ciferoj ne estas tute precizaj). — Suma membronombro je la 1/1 1964: 456. Aliĝoj: 30, eksiĝoj: 45. Membronombro je 31/12: 441. — Okazis 187 klubkunvenoj, meznombre ĉeestis proks. 55 %; estas raportita 100-procenta ĉeesto. — Raportiĝis 48 estrarkunvenoj, 17 festoj, ekskursoj k.t.p. En 8 kluboj laboris 9 studrondoj kun 50 membroj. 6 kluboj raportas pri biblioteko kun sume 195 volumoj. 104 klubanoj posedas elementan ekzamenon, 59 superan, 2 instruistan.

La kluboj kontentige raportadis dum 1964, sed ankaŭ la Estraro zorge urĝigis pri mankantaj raportoj. La intereso inter la membroj grandparte ŝajnas esti bona.

*Prelegvizito.* Aŭtune Akademiano F. Faulhaber vizitis 6 klubojn prelegante pri Esperantaj temoj.

*Teatra Sekcio,* gvidata de C. Støp-Bowitz, sendis distraĵojn al kluboj, kiuj petis pri tio.

### STUDLABORO

*Kursgvidantoj.* Neniu eksterlanda kursgvidanto agadis en la lando dum 1964. Kaj dum la printempa kaj dum la aŭtuna jarduono en kelkaj lokoj okazis kursoj gvidataj de lokaj fortoj.

*Kursoj.* Per lokaj fortoj okazis 4 kursoj por komencantoj kun sume proks. 30 kursanoj en Kristiansand, Mo kaj Oslo. Raportiĝis 3 kursoj por progresantoj kun 26 kursanoj en Horten kaj Oslo. Okazis ankaŭ kelkaj kursoj pri kiuj raportoj ne estas ricevitaj, aŭ kiuj je la jarfino ankoraŭ ne finiĝis.

*Korespondaj kursoj.* La Sekcio pri Koresponda Instruado estis gvidata de Else-Margrethe Müller, Trondhejmo. Estis bona kunlaboro kun «Folkets Brevskole», kiu uzas la kursojn de N.E.L., sed mem prizorgas administradon kaj anoncadon. N.E.L. havigas instruanton kaj ricevas raportojn pri lernantoj, kiuj plenumas la kursojn ĉe «Folkets Brevskole». Ankaŭ Norvega Blindula Asocio utiligas la kursojn. — Ĉe N.E.L. aliĝis al la unua parto 25 kursanoj, al la dua parto 5 kursanoj. Oni daŭre liveris la kursojn por reduktita tarifo al gejunuloj; 13 lernantoj en la unua parto kaj 1 en la dua estas tiaj. Ĉe «Folkets Brevskole» aliĝis al la unua parto 23 kursanoj, al la dua parto neniu. — 1 el la kursanoj estas varbita de membro de N.E.L. Ĉiuj, kiuj plenumis la unuan parton, ricevis duonjaron abonon al Norvega Esperantisto kaj proponon pri membreco. — Instruis E. Holten, L. K. Hunnes, M. Tveit, por la junuloj L. Anjer, por «Folkets Brevskole» Ragnv. Rian, por blinduloj H. Karterud. — La kurso estis 4-foje anoncata en la semajna gazeto «Hjemmet» dum la aŭtuno.

*Gazeta kurso* aperadis en 1964 en «Ryfylke», Sauda. Oni havigis 6 novajn matricarojn de la kurso, kaj krome 4 matricarojn al la gazetoj de la 4 nordlandaj abstinencaj fervojistaj asocioj, laŭ aranĝo de Erling P. Næss.

*Perfektiga studado.* La Ekzamena Komisiono ankaŭ dum 1964 korektadis taskojn por interesiĝantoj. Vendiĝis kelkaj kajeroj de ekzerctaskaroj. Oni aparte klopodis igi la membrojn studi por ekzameno.

*Ekzamenoj* Ordinara ekzameno okazis en Junio en Oslo. 6 kandidatoj plenumis la elementan ekzamenon, neniu la superan. Plie okazis speciala ekzameno por 10 popollernejaj infanoj. — La Ekzamena Komisiono konsistas el: C. Støp-Bowitz (prez.), Olav Rygg (sekr.), Eva Støp-Bowitz (kas.), Jens Schjerve kaj Elfrid Vormdal (membroj). Ekzistas 7 lokaj ekzamenaj komitatoj, nome en Bergen, Haugesund, Sauda, Stavanger, Tromsø, Trondhejmo, Østfold, kaj 6 ekzamenaj delegitoj ekster la komitatoj.

## INFORMADO

*Informa Fako* (Komisiito pri informado: Ludvig Anjer). La komisiito per cirkuleroj kaj leteroj instigis al informa aktiveco. Li redaktis la norvegan tradukon de la teksto de la peticio al U.N.O. kaj prizorgis ĝian presigon.

*La Propaganda Fondaĵo* kreskis nur per la bankinterezoj kaj posedas nun kr. 5245,45. Al tiu fondaĵo aldoniĝos la donacoj, kiujn havigas la Financa Komisiono.

*«Esperanto-nytt».* Ĉar la poŝto faris malfacilaĵojn pri la ekspedado kaj ĉar la komisiito pri informado pro eksterordinara profesia okupiteco ne havis okazon fari decidajn paŝojn por ĝia reaperigo, tiu informbulteno ne aperis dum 1964.

*Informbroŝuroj.* Oni daŭre uzadis «Esperanto-nytt» n-ro 3/1961 (kaj parte ankaŭ aliajn numerojn) kiel ordinaran broŝuron. — La faldfolio «Velkommen til Esperanto-bevegelsen» estis disdonata al ĉiuj kursanoj por montri al ili la avantaĝojn de membreco.

*Gazetara Servo,* gvidata de Ludvig Anjer, elsendis al ĉiuj norvegaj ĵurnaloj 10 bultenojn kun sume 24 novaĵoj pri Esperanto, parte pere de lokaj reprezentantoj; 7 el la bultenoj aperis en ambaŭ oficialaj norvegaj lingvoformoj. La ekspedadon akurate prizorgis s.ino Nanna Fridrichsen. Oni daŭre abonis eltondaĵojn per la firmao «Argus». Arĥivigon konscience prizorgas s.ino Ruth Herlofson. Oni registris 253 aperigojn de novaĵoj elsenditaj de la Gazetara Servo, 188 novaĵojn kaj artikolojn el aliaj fontoj. Entute oni do registris 441 aperigojn (578 en 1963) en 91 gazetoj kaj revuoj (103 en 1963). Atako al Esperanto ne okazis.

*Radio,* komisiito: R. Bugge-Paulsen. Okazis neniu radioelsendo pri Esperanto, sed la inaŭguro de la Esperantovojo en Jørpeland estis montrata en la televido.

*Interŝtataj organizaĵoj,* komisiito: R. Bugge-Paulsen. La komisiito akiris subskribojn de 6 ministroj kaj parlamentanoj por la propono pri U.E.A. por la Nobel-premio pri paco 1965. Plie li tre sukcese kolektis subskribojn de eminentuloj al la Alvoko de la Financa Komisiono, kaj nun okupiĝas pri «parlamenta kampanjo» kunlabore kun s.ro Malmgren.

*Blinduloj.* La komisiito, Otto Prytz, prizorgis Esperanto-kursojn en la blindullernejo Huseby. Oni klopodis konservi la devigan instruadon de Esperanto en la blindullernejo Dalen en la nova naŭjara unueca lernejo (por blinduloj dekjara), sed vane, tiel ke la Internacia Lingvo estos instruata tie nur kiel libertempa okupo. La Norvega Blindula Asocio malfondis sian Esperanto-konsilantaron, kio aktualigos restarigon de la Norvega Asocio de Blindaj Esperantistoj.

*Skoltoj.* La komisiito, Hans Amund Rosbach, Folldal, serĉas kontakton kun norvegaj esperantistaj skoltoj. Li igis ankaŭ la knabskoltan asocion akcepti insignon por Esperanto kaj laboras pri gvidlibro por la insigno. Ankaŭ kun la skoltina asocio li havas bonan kontakton.

*Junularo.* Komisiito ne funkcias dum 1964.

*Faksekcio por Instruistoj* estis gvidata de Astrid Mansrud.

*Esperanto en la lernejojn* (prezidanto de la Komisiono por Lerneja Kampanjo: C. Støp-Bowitz). Astrid Mansrud ne ricevis permeson por daŭrigo de la instruado en la programo de la popollernejo, precipe pro kontraŭstaro flanke de pli aĝaj instruistoj de la angla lingvo, sed daŭrigas la instruadon al la interesiĝantaj lernantoj sur privata bazo. 3 junaj koleginoj ŝiaj faris la elementan ekzamenon kaj 10 lernantoj specialan, tre elementan ekzamenon. — Daŭre venis neniu eĥo al la rezolucio sendita de la landa kunzveno 1963 al ĉiuj norvegaj esperantistaj instruistoj kaj lektoroj kun rekomendo klopodi pri akiro de permeso por eksperimenta instruado de Esperanto en siaj lernejoj. — En la definitiva nova plano por blindullernejoj Esperanto tamen ne estos deviga temo.

*Informaj prelegoj.* Raportiĝis 19 informaj prelegoj en Alvdal, Bergen, Bodø, Bryne, Fana, Larvik, Laksevåg, Lofthus, Os, Oslo kaj Sarpsborg, kun sume 975 aŭskultintoj. 10 el la prelegoj okazis en Bergen kaj ĉirkaŭaĵo laŭ iniciato de A. Kyllingstad, prelegis Johan Hammond Rosbach.

*Nordlanda Esperanto-Komitato* (reprez. de N.E.L.: C. Støp-Bowitz). La komitato ne montris aktivecon.

*Esperanto-stratoj.* Printempe la komunuma estraro de Elverum decidis nomi unu straton laŭ Esperanto. La inaŭguro okazos dum la 17a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanta Federacio okazonta en Hamar 22.-28. Majo 1965. La sukceso estas rezulto de klopodoj precipe de Per Johan Krogstie. Aŭtune la komunuma estraro de Jørpeland laŭ iniciato de Tr. Müller decidis nomi unu straton laŭ Esperanto, kaj la inaŭguro de «Esperantovegen» okazis la 12an de Decembro 1964.

DIVERSAĴOJ

*Norvega Esperantisto.* — Aperis 5 ordinaraj numeroj 16-paĝaj kaj unu 8-paĝa, kaj 2 duoblaj numeroj 16-paĝaj, sume 120 paĝoj. La enspezoj per kotizoj kaj anoncoj ne permesis eldonon de 10 plenaj 16-paĝaj numeroj. La redakcia komitato konsistis el Johan H. Rosbach, Sarpsborg, kaj Hans A. Rosbach, Folldal, kun la unua kiel ĉefredaktoro. La espedadon tre akurate prizorgis Tharald Dybing, kiu aranĝas ankaŭ pri la adres-stenciloj. La abonkotizo estis kr. 8,00. — La gazeto estis redaktata ĉefe laŭ la samaj principoj kiel en 1963.

*«Pro Merito».* Okaze de la datreveno de la fondiĝo de N.E.L. oni donis la gradon «Granda Kruco» al Ragnv. Rian.

*Biblioteko.* La pruntedoneblaj libroj daŭre staras en la oficejo de NEL., la ceteraj estas sekure magazenitaj. La kresko de la biblioteko ĉefe rezultis el recenz-ekzempleroj, kiujn ricevis Norvega Esperantisto, kaj gazetoj ricevataj interŝanĝe kun ĝi.

*Bibliografio.* La ciklostilita eldono de la bibliografio pri norvega literaturo tradukita en Esperanton, verkita de Lars Kåre Hunnes, aperis aŭtune 1964.

*Turistbroŝuro pri Oslo.* La Turisttrafika Asocio de Oslo pretigis novan turistbroŝuron pri la ĉefurbo kaj presigis ĝin en 10 000 ekzempleroj. Post informo en la Esperantogazetaro la stoko elĉerpiĝis en du monatoj, post kio la Turisttrafika Asocio presigis pliajn 10 000 ekzemplerojn.

*Filmo «Bonvenon al Oslo».* Kopioj de la filmo daŭre cirkuladas en la mondo. La Turisttrafika Asocio de Oslo pretigis ankoraŭ unu kopion.

*Turisma Servo de N.E.L.,* sub gvidado de la Liga Estraro per la prezidanto, peris aliĝojn kaj informojn por la norvegaj anoj de la kongreso en Hago kaj aranĝis fervojan karavanon. Aŭtune la Turisma Servo dissendis informojn pri la 50a Universala Kongreso en Tokjo. Oni laboras pri komuna nordlanda flugkaravano al Tokjo.

*Internacia organizo.* La kunlaboro kun U.E.A. estis bona. Ĉefdelegito por Norvegujo estas Alfred Skyberg, Komitatono A de N.E.L. estas Ludvig Anjer. C. Støp-Bowitz estas Komitatano B. Anjer partoprenis la Komitatkunsidojn dum la kongreso en Hago. En 1964 estis 69 Delegitoj en 28 lokoj en Norvegujo. La nombro de Individuaj Membroj de U.E.A. estis 102. En la konkurso de U.E.A. Norvegujo atingis la 12an lokon kun 84,90 %.

*Nobel-premio de paco al U.E.A.* La propono pri U.E.A. kiel kandidato estas ripetita por 1965.

*Jaro de Internacia Kunlaborado.* Post enketo inter kluboj kaj membroj N.E.L. decidis partopreni en la aktivecoj de U.E.A. rilate al tiu UNESKO-projekto. Antaŭ ĉio oni presigis norveglingvan tekston sur blankedojn por kolektado de subskriboj al peticio pri Esperanto al U.N.O., dissendis la foliojn kaj admonis la membraron al vigla kolektado.

*49a Universala Kongreso de Esperanto* okazis en Hago. Aliĝis 31 norvegoj, sed ne ĉiuj ĉeestis. La Norvegan Registaron reprezentis R. Bugge-Paulsen, N.E.L.n reprezentis Tom Arbo Høeg.

*Nordlanda Esperanto-Kongreso.* Interkonsente kun Klubo Esperantista en Oslo NEL prenis sur sin la aranĝon de Nordlanda Esperanto-kongreso en Oslo 19.—22. Junio 1965.

*Helpagado.* Laŭ peto de U.E.A. N.E.L. prenis sur sin helpi al la novaj landaj asocioj en Madagaskaro kaj Mocambiko per konsiloj k.t.p. Kun Mocambiko oni ĝis nun ne akiris kontakton, sed la kunlaboro kun Esperantista Asocio en Madagaskaro estas vigla, ĝis nun precipe por starigo de Esperanto-ekzamenoj.

*Kartoteko pri norvegaj esperantistoj.* La kartoteko enhavas nun 9152 kartojn pri esperantistoj en 691 lokoj.

*Koresponda statistiko.* N.E.L. kun ĉiuj sekcioj dum la jaro ricevis 1661 leterojn kaj 1021 presaĵojn kaj sendis 1326 leterojn kaj 3818 presaĵojn.

*La intereso pri Esperanto* evidente ne multe ŝanĝiĝis, se oni juĝu laŭ la demandoj k.t.p. pri Esperanto, kiujn ricevadas la oficejo de N.E.L., kaj konsiderante ke «Esperanto-nytt» ne aperis dum 1964. Nia «sistema varbado» estas regule aplikata al ĉiuj interesiĝantoj. La gazetaro kontentige publikigadis pri Esperanto.

*Konkludo.* 1964 denove montras konsiderindan malkreskon de la membraro. Tiu evoluo devas ne plu daŭri. Se ne estas eble starigi kursojn, ni devas serĉi novajn vojojn por eduki novajn esperantistojn kaj membrigi ilin. Oni povas ankaŭ klopodi por remembrigi perditajn membrojn. Ni posedas la rimedojn: lernolibrojn, korespondajn kursojn, gazetan kurson. Konsiderante la laborplanon de NEL ĉiu membro devas streĉi ĉiujn fortojn por utiligi ĉi tiujn rimedojn por turni la evoluon en la ĝustan direkton.

Oslo, 31/12 1964 — 23/3 1965.

NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

*C. Støp-Bowitz* *Ludvig Anjer*
*Tom Arbo Høeg* *Signe Haug*
*Karl Ekhaugen* *Olav Rygg*
*Jan Ekhaugen*





La 29-an de aprilo
Ronald Fangen estus 70-jara.

# Sexagesimo

*de Ronald Fangen*

Miraklo Dia estas l' eklezio !
Dum tiu mondo iras al pere',
eterne samas Kristo, nia Dio,
kaj staros Liaj regno kaj arme',
Dum mondaj regnoj venas kaj foriras,
al eklezio venos elize'.

Malam' degelos en ĉi tiu tago
simile al la neĝo kaj glaci' !
Satano falos, lia regn' kaj ago
malvenkos al l' arme' de nia Di'.
Kun laŭda kanto ili nun rikoltos,
kaj staros antaŭ trono de Mesi' !

Espero sankta ! Ho, promes' de Dio,
sekura kiel Dio en ĉiel' !
Se nokto longas, se mallumas ĉio,
l' espero lumas kiel maten-stel'.
Jen Dia vort': Premiĝos vi sur tero,
sed baldaŭ venos Mi al Izrael'.

*Laŭ «Guds menighet er jordens største under» de Ronald Fangen, norvega aŭtoro (1895-1946), kun afabla permeso de s-ino Fangen trad.: H.A.R.*

**HELSINGØR**

La 18.—25. de julio okazos la internaciaj feriaj Esperanto-kursoj (perfektiga - konversacia - kaj prepara kurso por naturmetodaj instruontoj) en La internacia Altlernejo en Helsingør (Danlando), belega loko kun parko kaj ĉe banstrando. Ĉiuj kore bonvenaj. Senpaga prospekto havebla ĉe

**L. FRIIS**
Ingemannsvej 9
**Åbyhøj, Danlando**

## La kalkuloj de Norvega Esperantista Ligo

SPEZOJ 1964

| | | |
|---|---|---|
| **Enspezoj:** | | |
| Klubkotizoj | | 2 175,00 |
| Rektaj membroj | | 1 315,00 |
| Rentumoj | | 230,06 |
| «Papirknivene» | | 500,02 |
| **Elspezoj:** | | |
| Kostoj | 1 222,88 | |
| Afranko | 1 121,10 | |
| Gazetara Servo | 618,25 | |
| Kotizo al U.E.A. | 595,00 | |
| Kotizoj al la Distriktoj | 201,50 | |
| Norvega Esperantisto | 461,35 | |
| | 4 220,08 | 4 220,08 |

*Norvega Esperantisto :*

| | | |
|---|---|---|
| Ĝia parto de la kotizoj | | 4 334,00 |
| Kostoj | 4 795,35 | |
| Deficito | | 461,35 |
| | 4 795,35 | 4 795,35 |

BILANCO je 31/12 1964

| | | | |
|---|---|---|---|
| **Aktivaĵoj:** | | | |
| En la kaso | | 273,80 | |
| Poŝtĝiro-konto 100.30 | | 1 568,10 | |
| Meblaro | | 552,88 | |
| «Pro Merito» | | 118,59 | |
| 243 akcioj en Esperantoforlaget A/S | | 5 346,00 | |
| «Kulepennen» | | 74,00 | |
| «Faktoj pri Norvegujo» | | 15,75 | |
| Debitoroj: | | | |
| Oslo Sparebank | 5 245,45 | | |
| Andresens Bank | 10 982,90 | | |
| Div. debitoroj | 1 754,44 | | |
| | | 17 982,79 | |
| **Pasivaĵoj:** | | | |
| Div. kreditoroj | | | 4 399,08 |
| La Kontorfondaĵo | | | 3 267,13 |
| La Propaganda Fondaĵo | | | 5 245,45 |
| Garantifondaĵo dumvivaj membroj | | | 617,00 |
| Jubilea kaso 1961 | | | 172,50 |
| Loterio | | | 3 082,65 |
| Esperanto-nytt | | | 1 568,51 |
| Konservitaj klubkasoj | | | 325,02 |
| Kapitalo | | | 7 254,57 |
| | | 25 931,91 | 25 931,91 |

Oslo, la 31an de decembro 1964 / la 23an de marto 1965.

*John Selbekk* — Revizoro

*Karl Ekhaugen* — Kasisto

## La Korespondaj Kursoj

(Avdeling for Brevundervisning)

SPEZOJ 1964

| | | |
|---|---|---|
| **Enspezoj:** | | |
| Venditaj studleteroj | | 503,15 |
| **Elspezoj:** | | |
| Kostoj | 275,65 | |
| Afranko | 63,00 | |
| Studmaterialoj uzitaj | 160,00 | |
| Al la kapitalo | 4,50 | |
| | 503,15 | 503,15 |

BILANCO je 31/12 1964

| | | |
|---|---|---|
| **Aktivoj:** | | |
| En la kaso | 23,84 | |
| En la poŝtĝira konto | 227,78 | |
| En la Poŝta Ŝparkaso | 2 127,00 | |
| Forretningsbanken D.N.K. | 3 200,00 | |
| Studmaterialo | 4 580,00 | |
| **Pasivoj:** | | |
| Kapitalo | | 10 158,62 |
| | 10 158,62 | 10 158,62 |

Spezkontoj kaj bilanco je 1/1 1965 kongruas kun la libroj, bankkontoj kaj poŝtĝirokonto. La studmaterialo ne estas detale kalkulita.

Trondhejmo, 4/2 1965.

*Else-Margrethe Müller* — Kasistino

*Eilif Schei* — Revizoro

## 50-a Universala Kongreso de Esperanto

**Tokio 31/7 — 7/8 1964**

Sub la Alta Protektado de D.ro Yuji Shibata, Prezidanto de la Japana Akademio

LOĜADO EN TOKIO

La Kongresanoj, kiuj deziras rezervi hotelĉambron pere de la Loĝiga Servo, nepre uzu la koncernan mendilon en la Dua Bulteno. Sur la mendilo estu klare indikitaj la datoj de alveno al Tokio kaj de foriro. Tiuj personoj, kiuj post la Kongreso partoprenos aliajn manifestaciojn en Japanujo, bonvolu indiki ankaŭ la datojn de reveno al Tokio kaj de definitiva foriro. Se tiuj datoj ne estas indikitaj sur la mendilo, la Loĝiga Servo rezervas la hotelĉambron nur por la kongresa periodo (31/7—8/8).

MANIFESTACIOJ POST LA U.K.

De la 9-a ĝis la 13-a de aŭgusto okazos Postkongresa Ekskurso al Kioto kaj Nara. Detaloj troviĝas en la Dua Bulteno. De la 13. ĝis la 15. de aŭgusto okazos en Kameoka (Kioto) «Oomoto-Internacia Festivalo». De la 8. ĝis la 15. de aŭgusto okazos en Ootu la 21a Internacia Junulara Kongreso. Detaloj troviĝas en la Dua Bulteno. De la 15. ĝis la 17. de aŭgusto okazos tritaga ekskurso al Gifu, Nagoja kaj

Toba. La ekskurson rajtas partopreni maksimume 38 personoj. Detalajn informojn donas *nur* Tokai Esperanto-Ligo, 1—51 Tohata-tyo, Syowa-ku, Nagoya, Japanujo. — De la 13. ĝis la 15. de aŭgusto okazos ekskurso al Hiroŝima. Detalajn informojn donas *nur* Hiroŝima Esperanto-Societo, P.O. Box 24, Hiroshima-Nishi, Japanujo.

POSTKONGRESO

La partoprenantoj de la tuttaga ekskurso je la 8-a de aŭgusto, kiuj samtempe deziras partopreni la Postkongreson, forveturos karavane el Tokio la 9. de aŭgusto en la mateno, ĝustatempe por partopreni la manifestaciojn de la Postkongreso.

KOTIZOJ DE POSTKONGRESO

La partoprenantoj de la Postkongreso, kiuj revenos al Tokio je la 13a de aŭgusto (tuj post la fino de la Postkongreso) devas pagi 220,— gld. La aliaj, kiuj ne revenos al Tokio je la menciita dato, devas pagi 200,— ned. gld. Por la unuaj estos rezervita sidloko en la trajno Kioto-Tokio; por la aliaj ne.

STATISTIKO

(je 20/3 1965). Alĝ. 1, Arg. 4, Aŭstral. 27, Aŭstrujo 8, Bah. Insuloj 2, Belg. 7, Braz. 9, Brit. 43, Bulg. 11, C.A.R. 1, Ĉeĥ. 1, Danl. 19, Finnl. 6, Franc. 87, Ganao 1, Germ. 41, Hind. 1, Hisp. 7, Hong-Kong 2, Hung. 8, Irl. 1, Isr. 2, Ital. 30, Jap. 746, Jug. 10, Kameruno 2, Kanado 6, Maroko 2, Meksikio 2, Monako 2, Ned. 32, Norv. 11, NovZ. 15, Poll. 29, Port. 1, Rum. 1, Sovetunio 1, Sved. 49, Svisl. 12, Urug. 4, U.A.R. 1, Usono 52, Venez. 3.

Entute el 42 landoj, 1300.

*G. G. Pompilio*
**Konstanta Kongresa Sekretario**

———

# Ni invitas vin

veni al Helsingør (Elsinoro) por ĉeesti niajn internaciajn feriajn kursojn, konatajn en la tuta Esperanto-mondo, ĉar ili funkcias jam dum pli ol 30 jaroj. Ordinare ĉeestas pli ol 100 personoj el 10-15 diversaj landoj. Tie vi havos bonan okazon por akiri konversacian ekzercon kaj internacian amikecon kun multaj diverslandaj gesamideanoj.

La hejmo de niaj kursoj estas *La internacia Altlernejo,* kiun ĉirkaŭas granda parko, kie la kursanoj ĝuas multajn promenojn. Ĉiuj partoprenantoj loĝos kaj manĝos en la altlernejo. Tiel ni anoj de multaj landoj estos unu granda rondo familia, kie estos parolata nur Esperanto. La ordinara kategorio estas tiu de 3-4 litaj ĉambroj. Ankaŭ du- kaj unu-personaj ĉambroj estas haveblaj. La adreso de la altlernejo estas: Den internationale Højskole, Kongevej 72, Helsingør, Danlando.

Nur antaŭtagmeze okazos la instruado en jenaj kursoj:

1) *Konversacia kurso* por tiuj, kiuj deziras parolekzercon. Ĝin gvidos lerte, parolige kaj ridige f-ino Ida Christensen, kiu verkis la konatan libron «La Forto de l' Vero», kaj f-ino Riisberg, Kopenhago.

2) *Perfektiga kurso* por tiuj, kiuj deziras gramatike kaj stile perfektiĝi. Ĝin gvidos s-ro Moravec, Flensburg, Germanujo.

3) *Elementa kurso* por tiuj, kiuj scias neniom aŭ nur malmulte pri Esp. Ĝin gvidos s-ro Søgård-Hansen, Aarhus, laŭ Naturmetodo, la plej bona kaj plej natura metodo, per ĝi ĉiu lernas nian lingvon tiel nature, kiel niaj infanoj lernas la gepatran lingvon.

4) *Prepara kurso* por naturmetodaj geinstruistoj. S-ro Søgård-Hansen gvidos ankaŭ ĝin. Per la elementa kurso la novaj naturmetodaj geinstruistoj havos eblecon sperti, kiel facile lernas lernantoj, eĉ se ili venas el diversaj landoj.

5) *Infankurso* estas aranĝata, se aliĝos sufiĉe da geknaboj.

Ankaŭ *Feriaj gastoj,* ne dezirante partopreni iun kurson, rajtos ĉeesti la semajnon.

Posttagmeze ni aranĝos komunajn ekskursojn al div. vidindaj lokoj, ekz. al Kronborg (kastelo de Hamleto), Hillerød, sveda urbo Hälsingborg. — Vespere ni aranĝos prelegojn, ian gajan programon, internacian balon, kantadon, prezentadon de filmo ktp.

*Kostoj* (plena pensiono kaj kurskotizo) por ĉiu persono laŭ jenaj kategorioj:

| | |
|---|---|
| 3—4 persona ĉambro ...... | 210 d. kr. |
| 2-persona ĉambro ......... | 230 d. kr. |
| 1-persona ĉambro ........ | 260 d. kr. |

Infanoj malpli ol 6-jaraj pagas nur duonan prezon, malpli ol 12-jaraj trikvaronan prezon.

En la parko de la altlernejo ekzistas la ebleco de tendumado. Oni pagos por tio kaj kiel kurskotizon 50,00 dkr.

Neforgesebla estos tia ferio en la sincere amika atmosfero de niaj internaciaj feriaj kursoj. Tial ne prokrastu la aliĝon, sed sendu ĝin baldaŭ (antaŭ 18/6 1965) al


L. FRIIS,
Ingemannsvej 9,
*Aabyhøj, Danlando.*

NB. La kurskomitato ne deziras, nek akceptas antaŭpagon de la kurskostoj. La kurskasisto akceptos la pagon en la dua kurstago.

———



# Nordlanda Esperanto-Kongreso



**en Oslo**
19/6-22/6
**1965**

INFORMILO 5

1. *Oficiala akcepto.* LKK ĵus ricevis la ĝojigan sciigon ke la partoprenontoj estos oficiale akceptataj de la urbestro de Oslo en la urbodomo! Tio okazos lundon la 21-an de junio inter la 16a kaj 18a horoj, kaj la programo estos jena:

Salutparoladoj de la urbestro de Oslo, Brynjulf Bull, kaj la prezidanto de Norvega Esperantista Ligo, C. Støp-Bowitz; la Urba Orĥestro ludos esperanto-marŝojn; montra gvidado tra la belegaj salonoj de la urbodomo kaj abunda regalo senpaga por ĉiuj kongresanoj!

2. *Propra poŝtstampo* oficiala por la Nordlanda Esperanto-Kongreso estas la dua ĝojiga sciigo pri kio ni povas raporti havinta respondon de la Ŝtata Poŝtorganizo kun permeso starigi subpoŝtoficejon en la kongresejo mem kie deĵoros esperantoparolantaj oficistoj. Tio verŝajne precipe ĝojigos la filatelistojn inter la partoprenontoj de nia kongreso. Ankaŭ estos speciala bankfako en la kongresejo.

3. *Diskut-temoj.* Jenaj temoj estos pritraktataj dum la kongreso:

a) Dum la laborkunsidoj 20/6 je horo 16-18: «Esperanto en la lernejojn» «Esperanto en la gazetaron» — danaj enkondukantoj.
«Esperanto inter la junulojn» — sveda enkondukanto.

b) Dum la ĝenerala kunveno 22/6 je

horoj 10-14 kaj 16-18: «La taskoj de Nordlanda Esperanto-Komitato» — finna enkondukanto
«La ĝenerala kunlaboro inter niaj Landaj Asocioj» — sveda enkond.
«Ekonomiaj problemoj»
«Informa laboro» —
norvegaj enkondukantoj.

4) *Postkongresaj ekskursoj.* Ekiro de ĉiuj 23/6 matene:

a) 5-taga vagonaro al Okcidentaj Fjordoj kaj perŝipe vizitante la famajn turistlokojn Åndalsnes — Geiranger — Olden — Bergen kaj reen al Oslo per vagonaro. Ĉio enkalkulita por n.kr. 570,—.

b) 4-taga vagonare trans la Altmontaron ĝis belega Flåm; aŭtobuse al konata Gudvangen — Stalheim ĝis Bergen kaj reen al Oslo per vagonaro, prezo n.kr. 360,-, ĉio enkalkul.

c) Aŭtobuse al Suda Marbordo: Haveno Kristiansand, trans la valo pitoreska Setesdal ĝis kamparana centro Dalen, de tie perŝipe sur la bela lago Nordsjø al urbo Skien kaj reen al Oslo per vagonaro, prezo n.kr. 350,-, ĉio enkalkulita. 4-taga daŭreco.

5. *Lasta aliĝdato por la kongreso* estas 15-a de majo, sed atentu ke tiuj kiuj atendas ĝis tiam, riskos ne esti akceptataj se la kvoto por partoprenado jam atingus 400, kio estas la maksimumo kiun oni povus akcepti pro manko da kunvenlokoj kaj hotellitoj. Do urĝas kun *via* aliĝo! — Jam anoncis sin partoprenontoj el multaj eŭropaj landoj krom la nordaj, tiel ke oni povos atendi vere internacian kuneston. La LKK faros sian plej eblan por agrabligi la restadon en Oslo kaj deziras KORAN BONVENON !

Oslo, 31/3 1965

LA LOKA KONGRESA KOMITATO
*John Berggreen*



# Norvega Kroniko

Red.: Karsten Langsholt

## JARKUNVENOJ

*Klubo Esperantista en Oslo.*

4/3. La prez. John Berggreen bonvenigis la ĉeestantojn kaj donis kelkajn informojn. — Okazis Ĝenerala Kunsido, gvidata de C. Støp-Bowitz.

Elektoj:
Prezidanto: John Berggreen (reel.)
Vicprezidanto: Otto Prytz (reel.)
Sekr. koresp.: Aslaug Refsing (reel.)
Sekr. raport.: Harda Danielsen (reel.)
Kasisto: Frank Aasheim (nova)
Estraranoj: Brynhild Østmo (reel.), Tore Haug (nova)
Anstataŭantoj: Tor Magnus Carlsen, Kirsten Ek (reel.)

Ankaŭ elektiĝis revizoroj, klubaj oficuloj kaj komisiitoj.

Rilate al la aranĝoj de la Nordlanda Kongreso en Oslo la ĝenerala kunsido aprobis proponon pri garantisumo de kr. 1000,— se la kongresaj kalkuloj montros deficiton. Se la garantio ne estos bezonata, la klubo donacos al la Propaganda Fondaĵo de NEL kr. 250. La Ĝenerala Kunsido nomis la multjaran, fidelan membron de nia klubo Tharald Dybing kiel Honoran Membron. — La prez. gratulis al Tharald Dybing kaj dankis la du estraranojn kiuj eliris el la estraro, pro bona kaj agrabla kunlaboro (Otto Koren post 6 jaroj kiel kasisto kaj Ellen Tangen pro forvojaĝo).

*Grupo Esperantista de Trondheim*

aranĝis sian jarkunvenon 2/2. Jen la nova estraro: prez.: Lars K. Hunnes (reel.); vicprez.: Oddmund Rykkvin (reel.); sekr.: Arne Olav Mjøen (nova); kas.: Kristian Fleischer (reel.); studgvid.: Else Margr. Müller (reel.).

La lasta parto de la kunveno estis rezervita por informoj. La prezidanto informis pri Nordlanda Esperanto-Kongreso okazonta en Oslo ĉisomere kaj instigis al ĉiuj partopreni. Fine la prez. deklaris, ke la Jarkunveno 1965 estas fermita. Li dankis al ĉiuj pro la partopreno.

## ORDINARAJ KUNVENOJ

*Klubo Esperantista en Oslo.*

15/2. La prezid., John Berggreen, memorigis pri la ŝipekskurso al Århus 8.—10. de majo. — La unua punkto estis «Festparolado UK 1964 de prof. d-ro I. Lapenna» prezentita per sonbendo de Tharald Dybing. — Dum la «10 minuta lingva instruado» Ludvig Anjer pritraktis la prezencan participon multe uzata en esperanto. Ĉar tiu verba formo malofte troviĝas en la norvega lingvo, en tradukaĵoj ĝi ofte estas anstataŭigita per subpropozicio. Li miris ĉu esperanto en norvega buŝo ne estus pli eleganta, elasta kaj ritma per plia uzo de la prezenca participo. — Dum la programpunkto «Ĉu vi scias . . . . ?» la prez. prezentis cifer-enigmon — tempo/spaco —. Li donis tre surprizan solvon, sed avertis ke li donos alian solvon dum venonta klubkunveno. — C. Støp-Bowitz informis ke li ricevis tute novan humoran esperanto-gazeton« «La Gaja Funelisto», prezo DM 0,16 po unu numero, jarabono DM 1,50.

**Bonvenon al Svedlando!**

Internacia kurso surmonte en belega regiono en sudokcidenta Svedlando 10.—21. julio. — Temo: Monda socio estas kreata. Paclaboro kaj pacesploro, nova dana ekonomia sistemo k.t.p. — Prelegoj, diskutoj, ekskursoj en amika atmosfero. — Petu prospekton :

**Feria hejmo «LA KOSMO»**
**VARNHEM, Svedlando**
tel. 0511/60069 aŭ 0500/19608

15/3. La prez. memorigis la membrojn pri aliĝo al la Nordlanda Kongreso. — En la serio «Mia alia intereso krom Esperanto» Leif Sandberg prelegis pri muziko. Tre amuze li rakontis pri siaj spertoj kaj travivaĵoj en la muzika mondo. Je aĝo de 6 monatoj li komencis — li fajfis. Iom post iom li lernis ludi plurajn instrumentojn, aliĝis al kantĥoroj kaj orkestroj en diversaj lokoj, en Trondhejmo kiel studento kaj poste en Usono. Li ankaŭ komponis, interalie li gajnis premion por la melodio de unu el niaj klubkantoj («Ĝoju, ĝoju, geamikoj»). Leif Sandberg komponis ankaŭ «Kluban Marŝon», tre populara melodio, multe ludata ankaŭ en eksterlando. — Ĉar li dum multaj jaroj estis kaj estas fakdelegito de UEA pri muziko — siatempe la sola fakdelegito pri muziko en la mondo — li ekhavis kontakton kun multaj eksterlandaj esperantistoj. La prelego estis prezentata bonhumore en modela stilo kaj rikoltis fortan kaj merititan aplaŭdon.

Dum la «10-minuta lingva instruado» Kirsten Ek klarigis pri la uzo de diversaj prepozicioj, precipe kiam ili estas ligitaj al verboj de movo. La forta aplaŭdo montris ke la membroj alte taksis la tre bonan klarigon pri la uzo de tiaj malgrandaj vortoj kiuj ofte kaŭzas al ni streĉan cerbumadon.

*Grupo Esperantista de Trondheim*

16/2. La prezidanto bonvenigis ĉiujn kaj oni komencis per kantado. Lingva kvaronhoro estis gvidata de s.ro Hunnes, kaj oni daŭrigis la tradukon de novelo de Arnulf Øverland: «Tridek Taleroj». — Sekvis paŭzo, en kiu la ĉeestantoj ĝuis bonan kafon k.t.p., kaj poste s.ro Utne ekhavis la parolrajton. Li faris vere interesan instruadon en meteorologio, kaj en la Esperanta terminaro pri tiu fako. Fine la prezidanto dankis al ĉiuj.

2/3. — 21 personoj estis alvenintaj kiam la prez. malfermis la kunvenon. S.ro Hunnes paroladetis pri «Antaŭfasta tago» kaj la religiaj kutimoj ligitaj al tiu fasto. Vere aktuala temo en tiu semajno. — Nun la prez. per kelkaj vortoj donis la parolrajton al s.ino Müller, la vespera gasto kaj paroladanto. S.ino Müller parolis kaj montris belegajn lumbildojn pri somerferia vojaĝo tra Svisujo kaj Italujo. — Vere interesa programero. — Dankinte al s.ino Müller la prezidanto transdonis la norveglingvan libron pri Zamenhof.

*La Esperantoklubo de Bergen*

kunvenis 25/2. La prez. tuj donis la vorton al Johs. Jahren, kiu parolis pri: kion fari por vivigi la kluban laboron. Dum jaroj la estraroj malfacile kaj senrezulte laboris. Tamen ili ne estas la kulpantoj, sed mankas io en la esperanta laboro. Oni devas enkonduki romantikon en la lingvon kaj la klublaboron, kaj per korespondado kaj interkomunikiĝo interesigi la junularon. — La sekr. redaktis kaj prezentis la klubgazeton «La lumturo»n. Fine li transdonis al la prez. Prezidantmarteleton. — La prez. legis la poemon «Homo estu senpatienca». Doris Birkelund prezentis kaj legis leterojn kaj redaktorajn komentariojn de la finna klubĵurnalo «Informilo». Vizitis nin ĉifoje trondhejma samideano s.ro Gjessing, kiu rakontis pri la kluba vivo kaj laboro tie. — La prez. de Okc. Distrikto, Leonora Sivertsen, informis pri la printempa kunvenaranĝo en Hogganvik kaj rekomendis la membrojn partopreni kaj sin aliĝi kiel eble plej frue. — La lingvan kvaronhoron Kjell Offerdal aranĝis kiel vetkonkurson, koncerne esperantajn vortojn. Ĉiuj partoprenis, kaj atingis pli malpli multajn poentojn.

Okazis diskut- kaj agrablkunesto 11/3. La vicprez. Johs. Jahren bonvensalutis la membrojn al la hejmo de Majken Wagle Jørgensen, kaj tiuj donis la vorton al la gastama mastrino. — Por esperantlingve aktivigi la membrojn, ili de antaŭe ekhavis taskojn por la vespera kunesto. Ŝi — la mastrino — disdonis pli malpli facilajn pecojn, Prozajn kaj poeziajn, kaj ĉiuj ĉeestantoj devis aktori: Kiel knabo kaj knabino, kato kaj muso, koko, kokino, k. s. La plej lertaj parolantoj ekhavis rolojn en «Komedio de l' arte», komike kostumitaj, kaj ili bone aktoris.

La mastrino regalis per kafo, teo kaj bonaj hejmfaritaj kukoj, kaj ni vigle parolis pri la someraj esperantaranĝoj. — Ni komplimentas Majken W. Jørgensen pro la bona aranĝo kaj vigla kunvenvespero.

*Norsk Esperanto-Forbund*
*(Norvega Esperantista Ligo)*
**Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30**
**Kontoradresse: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo**
**Telefon: 42 47 79**
**Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30**

*Turisma Servo:* **Boks 942, Oslo.**
**Postgiro 100.32**

*Esperantoforlaget A/s*
*(Eldonejo Esperanto A/s)*
**Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31**
**Kontoradresse: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo**
**Telefon: 42 47 79**

*Ĉefdelegito de U. E. A.:*
**S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a, Oslo-Bryn. Postgiro 133.29**

*La redakcio:*
**Privata adreso de la ĉefredaktoro:**
**Johan Hammond Rosbach,**
**C. E. Holters vei 7 C, Sarpsborg: - Uzu tiun adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj.**
**Telefono: 54 7 27**


Haaves Boktrykkeri, Brumunddal, Norvegujo